

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko sur germ. banko, sed ne per poŝtmandato. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — Prezo de unu numero: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 ŝved. kr., 0.50 ŝvis. fr., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 5/8 pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fr., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 15 hung. kr., 80 pol. mk., 400 aŭstr. kr.; germanoj abonu ĉe sia poŝtoŭficejo; balkananoj, balikanoj kaj rusoj demandu la abonprezon ĉe la Abonejoj; alivalutuloj pagas samvaloron de 0.50 franc. fr. aŭ unu stampitan respond-kuponon.

Liston de niaj Abonejoj vidu sur paĝo 31. Por Adresanĝoj ni devas kalkuli la prezon de 2 numeroj. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Abono al la Literatura Aldono (aperanta ne-regule) estas nedeviga. Du Literaturaj Aldonoj kostas la prezon de unu numero de ET.

Minimume 8-paĝa

fariĝos la speciala numero pri la urbo de nia XV-a Kongreso

Nürnberg

se vi ĝustatempe kunlaboros.

Ankoraŭ ĉi tiu angulo estas disponebla por komerca anonco.

BLDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gilli North, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekonto Köln 70663, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
po cm² 0.10 ŝvisa franko (aŭ ĉe antaŭpago 15 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

Numero 103 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 24. Septembro 1922.

Esperanto kaj Ligo de Nacioj.



Eminentaj amikoj de nia movado: (dekstre:) Lord Robert Cecil (Sud-Afriko).

Nia konstanta kunlaboranto, s-o H. Unger, fondinto de „Internacia Komercia Revuo“, sendas al ni la sekvantan raporton el Genève, kie li ĉeestas la 5-an Kunvenon de la Ligo de Nacioj. Ni volas aldoni, ke dank' al liaj klopodoj la gazetaraj agentejoj Hayas, Wolff kaj tiuj de Britio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Grekio kaj Svislando raportis pri Esperanto per specialaj telegramoj.

Estas konata fakto, ke Esperanto staras sur la tagordo de la nunjara Kunveno de la Ligo de Nacioj; tie ĝi estas la naŭa punkto.

La 5-a Komisiono de la Ligo, sub prezido de s-o Fielding (Kanadio), traktas la demandon pri „Esperanto kiel internacia helpa lingvo“. La kunsido de la 12. septembro de tiu Komisiono ekprenis la traktadon de la Esperanta afero, post kiam ĝi finis diskutadon pri la opio; pli poste oni okupiĝos pri la raporto de D-ro Nansen rilate al la mizero en Ruslando kaj la rifuĝintoj.

Kunsido: 12. sept. 1922.

Delegito de Suda Afriko, s-o Gilbert Murray, profesoro de greka lingvo ĉe la universitato de Oxford, raportas.

Jen resumo de lia raporto:

Iam li estis kontraŭulo de Esperanto. Sed li konvinkigis, ke tiu helpa lingvo jam estas multe uzata en la praktika vivo. Esperanto respondas al bezono, kiu ne estas fordiskutebla. La helpa lingvo neniam havas la celon, anstataŭ la naciajn idiomojn. Se oni serioze ekzamenas la demandon, sole Esperanto estas konsiderinda. Pri la praktika uzebleco de Esperanto la raportanto kolektis proprajn spertojn. La raporto (enketo) de la Ĝenerala Sekretariato de la L. d. N. (dokumento A. 5. 1922) estas tre interesa. „Kiel filologo mi admiras la konstruon de Esperanto.“

Fine li proponas rezolucion, kiu invitas la L. d. N. ankaŭ estonte observadi la progresojn de la Esperanta movado; la ŝtatoj estu invitataj, ekzameni, kiel Esperanto povos esti enkondukata en la servojn de poŝto kaj telegrafo.

Prenas la parolon s-o Edmond Privat kiel helpa delegito de la persa registaro:

Antaŭ ĉio li konstatas, ke Esperanto ne estas proponita kiel lingvo uzota de la Ligo; pri tio oni neniam parolis. La dulingva sistemo (angle-franca), uzata de la Ligo, montriĝis taŭga, kvankam ĝi nature ankaŭ alportis malavantaĝojn. Precipe la malgranda nacioj kaj la Malproksima Oriento suferas pro tiu metodo. Orientanoj legas la oficialajn raportojn de la Ligo nur kun granda peno. Sed pri tio ni ja ne diskutis, ĉar por efektiviĝi tiun ideon ni bezonus ankoraŭ generaciojn. Kion oni petas de la L. d. N., estas kuraĝiga parolo! Neniam ni intencas tuŝi la prestiĝon de la grandaj idiomoj. Menciante la francan lingvon, kiu al li estas kara, s-o Privat parolas

pri ĝia grava kultura rolo kaj pri jarcentaj tradicioj, kiuj honoras tiun lingvon de la diplomatio. Ankaŭ ni ne forgesu la anglan lingvon, kiu estas parolata tra la tuta mondo, kaj la hispanan, kiu estas la lingvo de 21 ŝtatoj. Ekstere de tiuj kulturlingvoj staras ankoraŭ multaj popoloj, ankaŭ atentindaj. Tial la sopiro al internacia helpa lingvo estas ĉe rimarkebla: lastatempe ĝi tre ofte kaj urĝe aŭdiĝas en komerca vivo, internaciaj kongresoj, scienco.

Mallonge la oratoro rakontas pri la historio de Esperanto: Zamenhof ne kreis kompletan lingvon, sed donis la bazon, sur kiu dum 30 jaroj praktike laborantaj homoj evoluis la lingvon. Ĉiutage la juĝon de fama filologo Mellet, profesoro en la Collège de France, li laŭdas la facilan parol-eblecon de Esperanto. Oni tro ofte parolas pri „artefarita“ lingvo. Lingvistoj al vi diros, ke „natura“ lingvo efektive ne estas la lingvo uzata de literaturistoj, sed la dialektoj, parolataj de la popolo...

Ni do petas de la L. d. N. kuraĝigan parolon por movado, kiu jam trovis la aprobon de diversaj registaroj kaj de multaj aŭtoritatoj.

Se la L. d. N. konstante prokrastas tiun aferon, tiam Esperanto vole-nevole ekzistos sen tia rekomendo. Sed la Pakto de la L. d. N. diras, ke la Ligo protektu internaciajn movadojn. Se la Ligo protektas ekz. la Internacian Oficejon por Mezuroj kaj Pesoj, ĝi neniel estas devigata ankaŭ pagi por ĝi. Tiam protekton oni donu ankaŭ al

Esperanto: Esperantistoj mem pagos siajn oficialajn instituciojn, kaj tiuj registaroj, kiuj propravole deziras subteni la movadon.

Parolante pri la oficiala aprobo de Esperanto en diversaj ŝtatoj, s-o Privat finas, dirante, ke la Ligo laŭ la nunaj cirkonstancoj verŝajne ne povas fari multe da bono por Esperanto, sed, rifuzante ian rekomendon, ĝi eble faros multe da malbono.

F-ino Bonnevie (Norvegio), en la nomo de sia registaro, kontraŭstaras Esperanton. Ŝi ilmas ankaŭ financajn konsekvencojn. Esperanto neniam povos anstataŭi naciajn lingvojn, kiuj malfermas la pordon al la civilizacio. La grandaj nacioj ne ankoraŭ akceptis oficiale Esperanton; tial la Ligo ne okupiĝu pri ĝi!

S-o Reynald (franco) petas, pro tro malfrua horo, ke la diskutado estu daŭrigata en la proksima kunsido de la Komisiono. (Akceptita.)



Eminentaj amikoj de nia movado: Dr. Inazo Nitobe (Japanujo).

La Mateno.

de Stevan Živanović.

Mia kapo kliniĝis. La urbo vekigis. Oni aŭdas la kriojn de kokviro. Mi forjetis mian plumon. Kvazaŭ logantan kanton mi aŭskultas el malproksime matensonoradon.

Min doloras la kapo, la sekreta deziro kaj la sopiro dum la nokto turmentis mian tutan korpon. Sonorilkantado ŝajnas al mi esti konvulsio de mia animo.

Ekstere ankoraŭ duonsongas la arboj, el la ĝardeno mi aŭdas najtingalan kanton. Ĉio estas tamen dezerta en mia animo, mi sentas fortan deziron pleniĝi tiun ĉi dezertaĵojn.

Aŭskultante mi apogas mian kapon sur vitro de l' fenestro. En mia animo estas nun malhelo. Bruta realeco vekigis.

Sed vidu, la suno levigis! La homoj iradas. Sur iliaj vizaĝoj kuŝas trankvilo, ili tras senbrue, trankvile, al sia laboro. Ili pensas nur noble!

Homoj, gardu la freŝecon de l' pensoj, kiun vi havas matene! Estu puranimaj, malpasial, nesolf-antaj! Je sango!

Tiaj mi vin amas!

La Vespero.

de Stevan Živanović.

Nun, kiam super la laciginta urbo falas vualo de l' nokto kaj la malhelo veturas en la valon, mi revas pri ĉio. Rigardante miajn revojn mi pensas pri la pasinteco; en ĝi estas entombigitaj ĉiuj miaj deziroj. La deziroj, kiuj ne atingis sian celon!

Nun estas vespero kaj ĉio trankviliĝis. Sopras facila venteto portante kun si etan nebulon en la vizaĝon. Mia animo sub lafrapoj de l' vero

singultas. Ne vidiĝas ankoraŭ hela ĉielo. En la malheletan ĉielarkon rigardas miaj okuloj. Ili serĉas ion, kio estas tre malproksima.

Cu mi eble revas pri feliceco de la homaro, tial ĉar mi perdis mian propran felicecon?

Jes, mi scias, ofte tio ripetiĝas, ofte...

Min instruis mia patrino, dum mi estis ankoraŭ malgranda infano, ke la homoj estas malbonaj. Tamen mi pensas, ke en ĉiuj koroj oni povus vekti la senton de l' anima nobleco. Oni nur devas eduki la homojn.

La Nokto.

de Stevan Živanović.

La malhelo tremetas per siaj flugiloj; kun ĝi venas la trankvilo kaj dolĉe rakontas pri sonĝo.

La luno estas sur la ĉielo. Mi rigardas ĝian tremetadon, ĝiajn radiojn, kiuj ŝteliras tra la fenestro kaj disjetas luksan lumon. Neaŭdeble kiel flugado de l' papilioj subeniras la malhelo fluŝtranta pri sonĝo.

Ne, mi ne havas trankvilon. Kaj vi, homoj, ankaŭ ne dormu, estu eterne maldormaj, ne permesu, ke oni vin logu per maltrankvilega vivado, forjetu de vi la tutan malbonon! Pensu senĉese pri la estonteco! Cu vi ne aŭdis, ke ie en la ĝardeno ekfloris la rozo de nova vivo plena je freŝeco kaj odoro? Pensu, pensu profunde kaj eduku viajn kunulojn.

Laŭ mistika rakonto nun estas la tempo de fantomoj. Oni aŭdas la kriadon de noktobirdoj sub la tegmento. En la korto la hundoj albojas la lunon. Homoj, ne dormu, estu maldormaj dum la nokta trankvilo, revu pri la nova tago, kiu alproksimiĝos!

VI estas la vivo, ne mortigu vin mem!

Kaj, kiam malsana pasio envenas vian animon, vi prenu la ĉenojn kaj ligu ĝin, sklavigu ĝin por ĉiam!

La almozulo sur la Arno-bordo.

Rakonto de Erwin Rosenberger.
Esperantigis L. Fischer.

Anspräuĉo, kiu antaŭ longa tempo, en la jaro 712-a, fariĝis reĝo de Langobardoj kaj ricevis la almonon „la Saĝulo“, promenis foje, kiam li estis en Firenco, sur la bordo de Arno. Tiam li ek-aŭdis bruetadon, similan al forta ronkado de dormanto. Anspraŭĉo proksimiĝis al la rando de l' terkavo, el kiu elĝis la bruetado, kaj efektive iu kuŝis tie kun fermitaj okuloj kaj malfermita buŝo. La dormanto estis tre ĉifonita, la suno rigardis profunde en lian ezofagon, muŝoj, kiuj ja ne tro atentis la purecon de iliaj promenejoj, promenis sentime sur liaj frunto kaj vango.

Anspräuĉo observis dum momento la homon kaj daŭrigis sian iradon. Li pensis: „Estas enigmo por mi, kial ekzistas en la mondo tiaj estaĵoj. Kion faras ili por la evoluo de la homaro? Oni povus tian hombalaĉon trankvile jeiti en Arnon. Tio influus neniel la direkton de la historio. La dormanto kaj la muŝoj, kiuj rampas sur li, — mi vidas inter ili nenian diferencon.“

La suno subiris, kaj Anspraŭĉo iris hejmen. Kaj li songis strange dum la nokto: En la terkavo ĉe la Arnobordo kuŝis malpurigita duone dispremita grajneto. El ĝi elkreskis infanoj, nepoj kaj pranepoj kaj longa vico da posteuloj, ĝis fine elĝis el ili viro, kiu kiel estro de grandegaj militistamasoj trapaŝis la landojn, tiel, ke sub lia piedo

tremis la terglobo kaj urboj kaj vilaĝoj cindriĝis kaj tronoj ŝanceliĝis kaj ruĝaj riveretoj trafuis la teron. — Terurite vekigis Anspraŭĉo el sia sonĝo kaj ĉirkaŭrigardis per larĝe malfermitaj okuloj.

Sed baldaŭ li ekdormis denove kaj staris denove sur la rando de l' terkavo. Sur la tero kuŝis la malpura duone dispremita grajneto. Li kliniĝis por jeiti la grajneton en Arnon, sed ĝardenisto kun neĝblanka, longa barbo kaj brunigitaj vizaĝo malhelpis lin dirante: „Malrapide! Malrapide! Ne forjetu miajn grajnetojn! Cu vi ne vidas, ke ili estas gravaj, eĉ nepraj? — Ili estas... antaŭuloj.“

La sekvintan tagon Anspraŭĉo iris refoje sur la bordon de Arno. En la terkavo kuŝis la sama almozulo ronkante. Anspraŭĉo rigardis lin denove, poste li frapetis malforte lian brakon por veki lin. Indigninte la ĉifonulo ekleviĝis kaj mezuris la kvietromponton per kolera rigardo. Li estis malgranda, havis helbluajn okulojn, elstarantan mentonon kaj delikate modelitan nazon. „Kiel vi nomiĝas?“ demandis Anspraŭĉo.

„Kial vin tio interesas? Se vi min ankoraŭfoje vekos, mi — la almozulo svingis minace la pugnon. — Anspraŭĉo donis al li arĝentan moneron: „Kiel vi nomiĝas?“

La almozulo prenis la moneron, rigardis lin kaj malaperigis ĝin en la ĉifonaro. „Bonaparte,“ li diris malafable, rekuŝiĝis en la herbon kaj turnis la dorson al Anspraŭĉo.

„Bonaparte — Bonaparte,“ ripetis Anspraŭĉo, „nomo kiel ĉiu alia!“ Kaj li ekmovis malestime la ŝultrojn.

La Kunsidoj de la V-a Komisiono pri Esperanto.

(Laŭ la oficiala „Journal“ de la III-a Kunveno de L. d. N., n-oj 10 kaj 11 kaj laŭ „Journal de Genève“ de 13. kaj 14. sept.)

Kunsido de la 12. sept. 1922.

Prof. Gilbert Murray (Sud-Afriko) diras, ke li, antaŭa kontraŭulo de Esperanto, havis okazon konvinkiĝi pri la praktika kaj eduka valoro de Esperanto, kaj, ke la raporto de la ĝeneral-sekretario de la L. d. N. ŝajnas al li tre interesa.

Li rekomendas akcepti jenan rezolucion:

„La L. d. N. komisiu la ĝeneral-sekretarion daŭre observi la progresojn de la Esperantista movado kaj raportu pri ĝi. Plue ĝi invitu la ŝtatojn, uzi Esperanton ĉe poŝta kaj telegrafa interrilatoj. La L. d. N. konstatastas kun intereso, ke jam kelkaj landoj favoras la enkondukon de Esperanto en lernejoj, kaj esperas, ke progresoj estu farotaj en ĉi tiu rilato.“

S-o D-ro Privat, kiel helpdelegito de la persa ŝtato, diras, ke ne temas pri tio proponi Esperanton por la diskuto de la L. d. N. La L. d. N. nur trovu kelkajn kuraĝigajn vortojn por la aŭtoritatoj de instruado.

F-ino Bonnevie (Norvegujo) kontraŭparolas. Akcepto de la propono Murray farus kostojn al la L. d. N. Esperanto ne povas anstataŭi la naciajn lingvojn, kiuj malfermas la pordojn al civilizacio. En Norvegujo oni ne povus aldoni pluan lingvon al la tri jam instruataj; angla lingvo tie estas la plej disvastigita.

S-o Reynald (Francujo) proponas, ke oni transdonu por ekzameno la demandojn rilate enkondukon de Esperanto al la Komisiono de la Kooperacio Intelektua. Cetere li laŭdas la objektivecon de la raporto de la ĝeneral-sekretario kaj esprimas la esperon, ke la decido de la Komerca Ĉambro de Paris portu bonajn fruktojn por la Esperantista movado en Francujo. Li plue rekonas la sincerecon de la klopodoj de la Esperantistoj.

Kunsido de la 13. sept. 1922.

S-o de Rio Branco (Brazilujo) opinias la raporton de la ĝeneral-sekretario tro tendenca. Ĝi tro multe similas al propaganda dokumento. La L. d. N. neniam donu sian helpon al movado, kiu estas danĝera por la lingvoj kaj kulturoj naciaj. La brazila delegacio nepre estas kontraŭulo al Esperanto, kiu ne povas prezenti iun valoron laŭ intelekta vidpunkto. Ĝi opinias, ke la ideo de enkonduko de internacia lingvo estas utopio, eĉ danĝera utopio. (Ĉi tiu opinio strange kontrastas al la oficiala helpo, kiun oficialaj rondoj en Brazilujo jam kelkfoje donis al nia movado. La red.)

S-o Reynald iomete alligas sian faritan proponon. Li opinias plue, ke malgraŭ ĉiu intereso, kiun prezentas Esperanto, ne estas oportune, ke L. d. N. invitu la ŝtatojn je enkonduko de Esperanto en lernejoj. Ĉiuj ŝtatoj estu liberaj. Internacia lingvo, ĉar artefarita, ĉiam akomodigos al bezonoj de uzado.

F-ino Forchhammer (Danujo) apogas la proponon de Reynald, sed opinias, ke oni devas pritrakti la aferon pli vaste. Antaŭ ĉi akcepti internacian helplingvon, oni esploru, ĉu alia lingvo ne estas pli taŭga ol Esperanto.

S-o Volonmaa (Finnlando) apogas la proponon de Murray. Li diras, ke la Finnlanda registaro dum la estinta kongreso de Esperanto estis surprizita, ke Esperanto estas tiel praktike uzebla por internaciaj kunvenoj.

F-ino Vacaresco (Rumanujo) apogas la proponon de Reynald. Ŝi certigas, ke Esperanto ne havas ŝancojn disvastiĝi en Rumanujo. (Eble la Rumana Esperanto-Centro havas la afablecon informi fraŭlinojn Vacaresco pri la malo, kaj doni al ŝi sincerajn pruvojn. La red.)

S-o Okuyama (Japanujo) apogas la proponon Murray nome de la landoj de la malproksima Oriento.

F-ino Bonnevie (Danujo), membro de la Komisiono de la Kooperacio Intelektua, postulas ne resendi la demandojn al la Komisiono, kiu havas pli gravajn taskojn, kaj resendus ĝin supoze al alia komisiono de fakuloj, per kio farigus novaj elspozoj al L. d. N.

S-o Sokal (Polujo) opinias, ke la V-a Komisiono sin devas okupi pri Esperanto; sed li ne kredas, ke la L. d. N. devas inviti la ŝtatojn je enkonduko de Esperanto. Ĉar la Komisiono ne estas kompetenta priligi la preferojn de la diversaj internaciaj lingvoj, li apogas la proponon de Reynald.

S-o de Agüero y Bethancourt (Kuba) apogas la proponon de Reynald. En Kuba ne estas eble enkonduki Esperanton en lernejojn, kie oni jam instruas francan kaj anglan lingvojn.

S-o Löfgren (Svedujo) kontraŭparolas la proponon de Murray, ĉar li preferas akcepton de vivanta lingvo kiel lingvo internacia. Aŭdinte la vortojn de f-ino Bonnevie, li ne opinias oportuna resendi la demandojn al la Komisiono de Kooperacio Intelektua. Li voĉdonas por rifuzo de ĉiuj faritaj proponoj.

S-o Lao-Hsin-Chu (Ĉinujo) helpas la proponon de Murray, ĉar la loĝantoj de Oriento pli facile lernas Esperanton ol iun ajn Eŭropan lingvon.

S-o Avramovitch (Jugoslavio) opinias, ke la momento ne jam venis por akcepto de internacia lingvo.

S-o Privat (Persujo), kiel anstataŭanto de la raportanto Prof. Murray, diras, ke okaze de resendo de la demando al komisiono de fakuloj la tuta mondo akceptus la decidon de tiu ĉi komisiono. Ĉiukaze oni devas decidi nun, kaj ne prokrasti la aferon de jaro al jaro. Li proponas anstataŭi la tekston de Murray per pli mallonga: „La Ligo de Nacioj, konstatante, ke Esperanto kiel helpa lingvo internacia, praktika por komerco kaj scienco, jam estas uzata kaj instruata apud la naciaj kulturilingvoj en kelkaj ŝtatoj, rekomendas al la membroj de la Ligo, bonvole informi ĝin pri novaj aranĝoj (france: des nouvelles mesures), kiuj ŝajnas al ili utilaj por disvastigo de uzado aŭ de instruado konforme al iliaj bezonoj.“

S-o de Brouckère (Belgujo) diras, ke pri ĉi tiu teksto ne povas esti voĉdonate, ĉar ĝi ne estas sufiĉe klara.

S-o M. Fielding, kiel prezidanto, voĉdonigas pri la propono de s-o Reynald, kiu estas akceptata per 18 voĉoj kontraŭ 8.

S-ino Coombe-Tennant (Anglujo) diras, ke ŝi nome de la brita ministerio por publika instruado deziras doni klarigon rilate la raporton pri Esperanto.

2. Propono Todoroff: La mallonga kaj senpartia raporto de la Komerca Ĉambro de Paris (de 9. febr. 1922), kies kelkaj partoj estas cititaj, estu aldonota al la raporto de la Sekretario kiel anekso.

3. Propono Forchhammer: La rezolucioj akceptitaj de la Komisiono estu aldonotaj kiel anekso al la raporto mem.

La raporto de la Sekretario poste estas akceptata unuvoĉe sub rezervo de la antaŭe nomitaj alligoj.

Laŭ propono de s-o Avramovitch kaj helpate de s-o Privat oni nomas s-on Reynald raportanto al la Kunsido de la L. d. N.

„Ke eĉ samideanoj nin trompas...“

Ĉu oni supozu tion ebla? Tamen tiel estas, bedaŭrinde! Kiom ofte mi lasttempe devas legi la petojn kaj admonojn de ET, ke oni pagu la abonojn. Ĉiujfoje mi ĉagreniĝas kaj samtempe hontas. Mi hontas, ke fakte ekzistas tiel senhontaj



Kunsido de la 5-a Komisiono de Ligo de Nacioj.

1. D-ro Privat; 2. D-ro Nitobe; 3. S-o Ador (antaŭ n-o 2, sen numero); 4. S-o Reynald (Francujo); 5. S-o Gilbert Murray (Suda Afriko); 6. S-ino Bonnevie (Norvegujo); 7. S-ino Coombe-Tennant (antaŭ n-o 6, sen numero); 8. S-o Rio Branco (Brazilujo); 9. S-o Volonmaa (Finnlando); 10. S-o Okuyama (Japanlando, antaŭ D-ro Privat); 11. S-o Lao-Hsin-Chu (Ĉinujo).

Kunsido de 14. sept. 1922.

S-ino Coombe-Tennant opinias, ke la raporto de la Sekretariejo donas bildon de la afero ne nur laŭ la faktoj sed ankaŭ laŭ konkludoj. Ŝi komunikas kelkajn alligojn, kiujn la brita „Board of Education“ deziras aldonitaj al la parto de la raporto, kiu pritraktas la instruadon de Esperanto en Grand-Britujo.

S-o Privat esprimas sian ĝojon, ke la Board of Education tiel atente trastudis la raporton, kaj deziras, ke aliaj aŭtoritatoj faris la saman. Li apogas la proponon de f-ino Coombe-Tennant.

S-ino Coombe-Tennant mencias i. a. ankoraŭ, ke la direktoro de la brita poŝto kontraŭstaras la enkondukon de Esperanto por poŝtaj kaj telegrafaj komunikoj.

S-o Privat proponas, ke la ĉapitro V-a de la raporto estu anstataŭita per la rezolucio de Reynald akceptita en la antaŭa kunsido.

S-o Löfgren opinias, ke la Komisiono ne estas kompetenta por alligi raporton de la Sekretario.

S-o Todoroff (Bulgarujo) proponas, ke la raporto de la Komerca Ĉambro de Paris estu aldonota al la raporto de la Sekretario.

F-ino Forchhammer opinias, ke la raporto de la Sekretario estu publikigota en sia aktuala formo, sed ke la ŝanĝoj akceptitaj de la Komisiono kaj la aldonoj de la Board of Education estu publikigitaj kiel anekso.

S-ino Coombe-Tennant preferas, ke la Komisiono akceptu ŝiajn ŝanĝproponojn kaj eligu ĉapitron V-an de la raporto.

S-o de Brouckère apogas la proponon.

S-o Avramovitch same.

S-o Reynald, f-ino Vacaresco, s-o de Tanguas (Hispanio) same.

S-o Privat ankaŭ apogas la proponon, sed deklaras apogi ankaŭ tiun de s-o Todoroff.

S-o Nitobe diras, ke la raporto estas verkita sub lia konstanta kontrolo, kaj ke li plene estas respondeca pri ĝi (france: „que le rapport a été préparé sous sa surveillance constante et qu'il en assume la pleine responsabilité“). La informoj estas donitaj de aŭtoritatoj kaj de Esperantistaj Asocioj, kaj li povas certigi, ke plena senpartileco regis ĉe la verkado de la raporto.

Post kelka diskuto la prezidanto instigas kunigi la diversajn proponojn je unu sola.

S-o Privat proponas, akcepti la raporton de la Sekretario kun jenaj alligoj:

1. Propono Coombe-Tennant: La Komisiono akceptas la alligojn faritajn de la brita delegacio kaj decidas forigi la ĉapitron V-an de la raporto.

samideanoj, kiuj mendis kaj akceptadas la gazeton kaj ne pagas ĝin. Tia farado estas tute malkomprenebla al mi.

Se mi volas legi gazeton, mi kompreneble devas pagi ĝin; mi do ne rajtas pretendi, ke oni senpage liveru al mi la gazeton nur pro tio, ke mi estas Esperantisto, kvazaŭ estus komplezo de mi permesi al la eldonejo sendi ĝin al mi. La gazeto ekzistas por ni ĉiuj, kaj ni ĉiuj havas intereson, ke ili povas ekzistadi. Certe neniu estas tiel naŭva opinii, ke gazeto povas ekzistadi nur per la idealismo; ne tio estas tute reala kaj praktika afero.

Se neesperantistaj revendistoj trompas la eldonantojn, tio estas jam sufiĉe malbona; sed ke eĉ samideanoj tion faras, tion mi fakte ne povas kompreni. Ĉu tio estas vera Esperantismo? Vera Esperantisto abonas kaj legas Esp. gazetojn, por scii, kio okazas en la Esperantista mondo; vera Esperantisto ankaŭ pagas la abonojn. Li ne pagas, por eble havigi grandan gajnon al la eldonantoj, li pagas pro propra utilo, por ne frue aŭ malfrue malhavi la gazeton, por certigi la pluaferon de la ĵurnalo. Krom tio la pago estas por li kiel por ĉiu alia honesta homo afero de deca konduto.

Ni rigardu iomete la aron de l' nepagantoj. Jen: 1. Tial, kiuj jam de komenco havis intencon por neniam pagi, kiuj tute intence trompas. Eble ili estas anoj eĉ de alia lando, ili tre bone scias, ke persekuto estas tre malfacila kaj malsimpla. Ili certe havas tre malbonan komprenon pri Esperanto kaj pri nia afero. Sed prediki al ĉi tiuj fluloj estas perdita peno. 2. Tial, kiuj iam volis pagi la abonojn, sed kiuj prokrastis tion de semajno al semajno, de monato al monato, tiel ke la sumo tiel pligrandiĝis, ke ili nun ne plu povas pagi. Ili eble hontas kaj tute ne respondas je la senditaj al ili admoniloj. Ĉi tiuj samideanoj estas ankoraŭ edukeblaj. Ili turnu sin konfidplene al la eldonantoj de ET. Mi estas certa, ke oni proponos al ili konveneblan pagmanieron, tiel ke ili iom post iom povas pagi la ŝuldojn.

Sen gazetoj ni ne povas ekzisti, tio estas tute evidenta. Kaj la gazetoj bezonas monon, ankaŭ tio estas tute klara. Sed ni aliaj, kiuj estas tiel „naŭvaj“ por regule pagi nian abonojn, ni ne povas toleri, ke la prezo de nia gazeto estos plialtigata pro tio, ke parto de l' abonintaro ne pagas. Do samideanoj, influu viajn prokrastemajn kamaradojn, ke ankaŭ ili faru sian devon. Se la prezo ŝajnas tro alta al iu, li kunabonu kun amiko, tiamaniere ĉiu bezonas pagi nur la duonon.

Foje mi turnas min al ĉiuj honestaj kaj serlozaj samideanoj: Se vi deziras, ke nia ŝatata ET prosperu, faru mem vian devon kaj kunhelpu, ke ankaŭ viaj pli facilanimaj kamaradoj ĝin faru. Ni ĉiuj per tio havos utilon. *Mallerta.*

Specialigo.

En ET 95 skribas s-o Henning Halldor: „La pedagogo, inĝeniero, komercisto, turisto, kiuj lernas nian lingvon, volas per ĝi atingi ion, kion ili ne povas atingi per sia gepatra lingvo.“ En tio ja kuŝas la ĉefpunkto de nia Esp. movado. Ni ne devas esti nur idealistoj, ne, ni precipe hodiaŭ devas pensi, kiel pensas la popolamaso, kiu volas atingi ion realan, kion ĝi ne povas atingi per sia gepatra lingvo. Se la komercisto, tramvoĵisto, fervoĵisto, poŝtoficisto, kelnero ktp. vidos, kiel granda utilo estas ligita kun la kono de Esperanto, certe tre baldaŭ la celo estos atingata. Sed en tiu kazo tre necesa estas la „specialigo“. Felice preskaŭ ĉie jam ekzistas — neesperantistaj — unuigoj de komercistoj, tramvoĵistoj ktp. En ĉiu urbo iru do la diversaj fervoraj Esperanto-propagandemuloj al la koncernantaj unuigoj kaj parolu kun la estraroj por ekzistigi ĉie Esp. fakkursojn kaj tiamaniere viglan Esp. movadon kaj kiel eble plej baldaŭ Esp. fakumigojn ĉe la diversaj branĉoj de la komuna vivo. Per ĉi tiu specialigo estos eble, ke la diversaj propagandistoj kiel eble plej efikplene povos labori sur diversaj apartaj kampoj je la intereso de la komuna Esp. movado. Ĉiu, kiu legis ET 76, 86 (sub „Wien invitas la XVI-an“), 92, 95 kaj 98 vidas miajn sukcesojn ĉe la tramvoĵistaro en Wien. Farigu per ĉi miaj linioj, ke kiel eble plej multaj propagandemuloj ankaŭ en la aliaj urbegoj kaj urboj de l' mondo specialigu sin kaj laboru sur la diversaj laborkampoj „en konsento“ je la komuna intereso!

Rudolf Michael Frey,
Wien, Gersthof.

La konkurso por infanoj.

Entute ĝis nun nur 49 infanoj partoprenis kaj ricevis premion. Bedaŭrinde ne ĉiuj anoncis al s-o van Heek, Hengelo (O), Steynstraat 72 (Hollando) la ricevon de la libroj kaj ankaŭ ne dankis al la donacinto. — Ili tuj faru tion indikante la nomojn de la verkoj ricevitaj. — Por instigi la infanojn multenombre partopreni la konkurso la premio estas de nun 200 germ. markoj. — Ĉiu, kiu skribos al s-o van Heek (vidu la kondiĉojn en ET n-o 94!), sendu samtempe liston de la libroj elektitaj al la firmo Butin & Jung, Esperanto-Eldonejo, Godesberg, Germanlando, laŭ ĉi suba listo en valoro de 200 germ. markoj.

Listo de libroj.

(La prezoj entenas la sendkostojn kaj validas por ĉiuj landoj, sed nur por infanoj partoprenantaj en la konkurso.)

Tra la mondo I (Legolibro)	100.—
Tra la mondo II (Legolibro)	160.—
Fricke, Universala legolibro	90.—
Brüggemann, Unua legolibreto	30.—
Brüggemann, Dua legolibreto	30.—
La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof (ilustr.)	50.—
Seidel, Vintro-fabeloj (tre belaj)	70.—
Raabe, La nigra galero (malstroverko)	75.—
Privat, Karlo (tre alloga legaĵo)	40.—
Moebusz, Dokumentoj de Esperanto	140.—
Christaller, Novetoj el la Nigra Arbaro	30.—
Zahn, Svisaj rakontoj	35.—
Vazov, Bulgaraj rakontoj	30.—
Lessing, Fabeloj	15.—
Loy, Spielend Esperanto	10.—
Andersen, Bildolibro sen bildoj	50.—

Por pli aĝaj infanoj:

Argus, Pro kio? (kriminalromano)	110.—
Avsejkeno, Fraŭlino Suzano (bela novelo)	50.—
Lessing, Minna von Barnhelm (klasika verko)	60.—
Goethe, Hermano kaj Doroteo (klasika verko)	90.—

Kiel helpi Ruslandon?

La Nederlanda Ĝenerala Komitato por Helpo al Malsatanta Ruslando starigis sektion por kolektado de poŝtmarkoj, kiuj estos vendataj profite al la malsatantoj. La gvidanto de tiu sekcio petis min entrepreni la kolektadon de poŝtmarkoj inter la Esperantistoj.

Pro tio mi petas ĉiujn gesamideanojn, kiuj havas tujn kaj volas cedi ilin por ĉi supre nomita celo, sendi ilin al mi. Ĉiuj poŝtmarkoj estas bonvenaj, ĉu uzitaj, ĉu neuzitaj, kaj el kiu ajn lando. Ankaŭ nederlandaj. Ĉiuj sendaĵoj estos kvitancataj en tiu ĉi gazeto.

Gesamideanoj! Je la nomo de la sennombraj malsatantoj mi petas vian helpon! Ĝi ne estu vana.

Sendu ĉion al

G. P. de Bruin,
Alleeweg 9, Enschede, Nederlando.

Praktika Laboro en la Laborista Esp.-Movado.

Por praktike utiligi Esperanton al la laborista movado la Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj starigis komisionon nomitan Nederlanda Laborista Esperanto-Servo.

Tiu Servo deziras ricevi el la eksterlando interesajn publikigindajn sciigojn, raportojn aŭ artikolojn pri socialaj, ekonomiaj aŭ politikaj okazintaĵoj kaj situacioj por traduki ilin kaj publikigi en la Nederlandaj laboristaj gazetoj. Reciproke ĝi estas preta sendi sciigojn ktp. por publikigo en eksterlandaj gazetoj laboristaj.

Por tio ni serĉas en ĉiuj landoj, escepte Anglujo, Francujo kaj Germanujo, spertajn kapablajn kamaradojn, kiuj povos helpi nin tiurilate.

Kamaradoj! tujmondaj! Nur per praktikaj provoj ni povos konvinki la laboristojn pri la utilo de nia lingvo. Por tio ni kunigu niajn fortojn.

Starigu ankaŭ en viaj landoj similan instituton aŭ laboru individue por tiu ĉi praktika laboro.

Ĉiukaze ni esperas, ke ĉiu laborist-Esperantisto, kiu povos, helpos nin! Se vi volas tion, skribu al la Ned. Lab. Esp. Servo, sekr.: G. P. de Bruin Alleeweg 9, Enschede (Hollando). Ĉiuj Esp. gazetoj bonvolu represigi ĉi tiun alvokon.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esperanto en Pola Lando.

BYDGOSZCZ. Novan kurson pollingvan gvidas s-ano Prengel. Regule partoprenas 20 p. — S-ano prof. Kleinerman, delegito de loka societo al Helsinka kongreso, raportis en lasta societa kunveno pri siaj kongresimpresoj. — Mardon la 19. 9. 22. parolis en „Esperanto-Hejmo“ s-ano inĝeniero Kalinowski el Chicago pri Nordamerika Esp. movado.

BIALYSTOK. S-o Šapiro gvidas kurson en vespera laborista lernejo de „Borocho“ laŭ Goldschmidta metodo. Partoprenas 25 p.

INOWROCLAW. S-ano Wł. Monarszynski fariĝis instruisto ĉe lernejo de „Staszyc“ en Inowroclaw. Fondinte dum sia restado en Miłostaw Esp. grupon, li nun penas starigi tian en Inowroclaw.

LWÓW. La en Polio plej gravaj „Orientaj Foiroj“ en Lwów aliĝis dum la duafoja foirado (5.—15. 9. 22.) al la ĉeno de Esperanton uzantaj foiroj. En n-o 13 de „Oficiala Gazeto por la II-a Orienta Foiro“ aperis pli longa pola-Esperanta (paralele) propagandartikolo de s-ano O. Berman el Łódź. En sama n-o aperis angulo menciante en pola kaj Esp. lingvoj la standojn, kie troviĝas la reprezentantoj de diversaj Esp. societoj. Nome: s-o Berman por Lodza Esp. Societo; s-o Szulc por Societo „Esperanto“, Bydgoszcz; s-o Kawecky por „Danziga Esp. Societo“; gedoktoroj Fels por Lwowa Esp. Societo. — La foiron vizitis diversaj diplomatoj kaj reprezentantoj de komerco el la landoj: Germana, Estona, Svisa, Sveda, Dana, Serba, Franca, Belga, Hungara, Jugoslava, Rumana, Itala, Ĉeĥoslovaka, Pola kaj Ameriko, el kiuj plej multaj scipovis Esperanton.

Pola Esperanto Servo.

La 2-a

Orient-Nederlanda Esperanto Kongreso.

okazis la 10-an de septembro en Arnhem kaj sukcesis bonege. Ĉeestis delegitoj kaj samideanoj el Arnhem, Amersfoort, Amsterdam, Apeldoorn, Culemborg, Deventer, Enschede, Hengelo, Nijmegen, Roermond, Zutphen kaj Zwolle. La honora prezidento s-o Baart de la Faille malfermis la kongreson kaj proponis kiel prezidenton s-on Adalberto Smit, kion la kongreso aklande aprobis.

Protokolo kaj jarraporto estis aprobataj. Kiel komitatanojn oni elektis: F-inon Wieriks el Nijmegen, kaj la s-ojn Aalderink el Amersfoort kaj G. van Heek el Hengelo.

S-o Adalberto Smit enkondukis la temon „Pri la propagando“, post kio s-o van Heek donis diversajn valorajn rimarkojn pri bonaj kaj nebonaj propagandmetodoj.

La venonta kongreso okazos en Zuffen. Post la luno paroladis s-o Luis el Düsseldorf. Interese kaj sprite li rakontis pri siaj spertoj kiel **ĉefo de U. E. A., estante samtempe pri la granda signifo de tiu organizo por nia movado.** Kora aplaŭdo dankis la paroladinton.

Posttagmeze okazis ekskurso al la parko Sonsbeek kaj intima vesperkunveno kun kantado, muziko kaj deklamoj estis la fino de tiu ĉi bonega kongreso.

Naciaj gazetoj kun Esp. fako.

Grava tagjurnalo „The Yorkshire Observer“ en Bradford, Anglujo, enkondukis ĉiumerkredan Esp. fakon. Por atingi plejble grandan utilon, ĉiulandaj s-anoj estas petataj sendi al s-o J. T. Holmes, Roundwood Grange, Baildon Shipley, Anglujo, interesajn sciigojn ĉu ĝeneralajn, ĉu pri Esperantaj. — La monata jurnalo de Ministrejo de Publika Instruado de Latvio havas Esp. fakon. „Kulturas Vestnesis“ de Latvia Kulturakcela Societo havas ĉiunumeran fakon kun Esp. kroniko kaj lecionoj. La Esp. fakojn gvidas s-ano Edgardo Grot. Grava jurnalo „Latvijas Sargs“, ĉefe disvastigita en komercistaj kaj terkulturistaj rondoj, eĉ ĉiutage enhavas Esp. fakon kun lecionoj. Adreso: Redakcio de „Latvijas Sargs“ en Riga, Latvio.

Esperanto en Varsovio.

Bona propagando en ĉiuj sferoj. S-o Oberrotman propagandas inter tramistoj, s-o Zajczkowski inter poŝt- kaj telegraf-oficistoj, s-o Teichfeld ĉe la polico (polica gazeto en Varsovio publikigis artikolon pri Polica Esp. Asocio Dresden). Ĉe Y. M. C. A. estas inter aliaj fremdlingvoj enkondukita ankaŭ Esperanto.

Fine de aŭgusto traveturis Varsovion itala, hispanaj, jugoslavaj kaj rusaj Esperantistoj revenantaj de la XIV-a. La gastoj interalie vizitis la urbestron s-on Nowodworski, kiu ĝojis pri la vizito de tiom da nacioj kaj konvinkigis pri la facileco de nia lingvo. D-ro Maruzzi metis florkronon sur la tombon de la Majstro, en la nomo de Jugoslavaj samideanoj.

Itala s-ano D-ro Toschi propagandis en Rumanio.

En aŭgusto s-ano D-ro Umberto Toschi, jurnalista el Bologna, vizitis la rumanajn samideanojn en Cluj kaj Bukureŝto. S-ano Toschi estis multe intervjua, skribis pri tio la Cluj'aj „Infratire“ (n-o 586), „Pairia“ (n-o 175) kaj „Keleti Ujság“ (n-o 181), kaj la Bukureŝta „Adeverul“ (n-o 11787) publikigis duonpaĝan favoran artikolon. En la ĉefurbo s-ano Piŝer-Galac dum tuta semajno servis la italan samideanon.

Peto al rumanlandaj samideanoj.

Por ebligi konstantan, precizan kaj ĉefe aktualan raportservon pri okazintaĵoj de enlanda Esp. vivo, ĉiu samideano estas petata sendi tiujn post la komencinta kurso, festeno, priesperanta artikolo en gazeto ktp. mallongan raporton (per poŝtkarto) al Tiberio Morariu en Cluj, Calea Traian n-o 40.

Laborista movado en Rumanio.

En Cluj komenciĝis samtempe tri kursoj ĉe laboristoj; gvidantoj: s-oj Balog kaj Samuel.

Sampierdarena (Italujo).

Plej kontentige finiĝis la por-instruista kurso aranĝita de Sampierdarena Esp. Soc. sub la oficialaj aŭspicioj de l' urbestro. Sekve de buŝaj kaj skribaj ekzamenoj, kiujn ĉeestis la ĝen. direktoro de la unuagradaj lernejoj, 16 urbaj ĝeinstruistoj ricevis la ateston. Aŭtune, Samp. Esp. Soc. malfermos duagradan porinstruistan kiel ankaŭ publikajn kursojn.

Amiko de Esperanto viktimo de la Scienco.

S-o Bergonié, membro-korespondanto de la Akademio de Sciencoj, profesoro en la medicina fakultato ĉe la Universitato de Bordeaux kaj honora prezidento de la loka Esp. grupo, kiu kreis metodon de vundkuracado per elektro kaj savis dum la milito multajn batalintojn, fariĝis viktimo de siaj sciencaj esploroj. La radioj „X“ necesigis kelkajn operaciojn en lia brako kaj fine amputon. Ni deziras al profesoro B. baldaŭnan resaniĝon.

Malfavora komerca ĉambro.

La Komerca Ĉambro de Marseille respondis tre malfavore al letero de la grupo de Beauvais, per kiu oni petis helpon al enkonduko de Esperanto en lernejoj.

Foiro de Paris.

Ĉiuj foiroj, komercaj firmoj kaj aliaj institucioj uzantaj Esperanton estas petataj urĝe sendi siajn eldonaĵojn en Esperanto por la Esp. budo en la Foiro de Paris de 1923, al la Esp. Centra Oficejo, kun surskribo „Por la Foiro“.

Nova gvidanto de TEHA.

S-o Leopold Dreher petas nin publikigi, ke pro sia translokiĝo li devas formeti la gvidadon de TEHA; la nuna gvidanto estas s-o J. Leizerowicz, Łódź, Killnskiego 28, Pollando.

Internacia Tramvoj-Kongreso.

La 2.—7. oktobro okazos en Bruxelles Internacia Kongreso de Tramvojoj, Lokaj Fervojoj kaj Aŭtobusoj. Multaj kongresanoj jam aliĝis kaj speciala programo estas preparata por inde akcepti la gastojn en Belgio. Ĉu la Internacia Tramvojistaro scias pri tio?

Nova kanto.

(Laŭ Heinrich Heine.)

Kantis malgranda harp-knabine',
Kantis kun vera sentado
Kaj falsa voĉo; min tamen tre
Kortuŝis ŝia ludado.

Ŝi kantis pri amo kaj ama ĉagren',
Rezigno kaj sinoferoj,
Kaj ĝojo post mort', en la dua mond',
Kiam pasis la teraj suferoj.

Ŝi kantis pri tera plor' kaj dolor',
Pri vivo sen suno kaj celo,
Kaj kantis feliĉon, se antaŭ l' anim'
Melferis sin pord' de l' ĉielo.

Ĝi estas malnova, rezigna kant',
Servanta nur por la lulo
De la popolo; se ploras ĝi,
La granda naivegulo.

Mi konas la kanton kun la melodi',
Mi konas ĝiajn aŭtorojn;
Predikas la akvon trinkadi al ni,
Sed mem ili trinkas likvorojn.

Pi bonan, novan kanton mi
Al vi, amikoj, instruos:
Dum la surtera viv' ni jam
La ĉielan regnon konstruos!

Ni volas ĝui jam sur la ter',
Sufiĉe ĝis nun ni sopris!
Ne plu englutu la gras-ventrul',
Kion man' laboranta akiris.

Ĉar kreskas sur ter' la gren' en sufiĉ'
Por ĉiuj teraj infanoj,
Kaj rozoj kaj mirtoj kaj belo kaj ĝoj',
Kuketoj kaj marcipanoj.

Jes, la vivĝojon por ĉiu ajn,
Sen plor' kaj almozpetoj!
Ĉielon tamen havu plu
Anĝeloj kaj la birdetoj.

Kaj se flugiloj cignaj al ni
Vere elkreskos post morto,
Bone, anĝeloj regalos nin
Per ĉielkukoj kaj torto.

Jen nova kant', pli bona kant',
Ĝi kiel flut' aŭdiĝas!
La „miserere“ pasis jam,
Mortsonorad' mutiĝas.

Fraŭlin' Eŭropo ligis sin
(Kvankam sen pastra beno)
Kun la genio de l' liber'
En ama ĉirkaŭpreno.

De la geedza lito jen
Aŭdiĝas gajaj ridoj. —
Vivu jun-edzo, jun-edzin'
Kaj iliaj estontaj idoj!

Esperantigis

D-ro Emil Pfeffer (Popolan), Wien.

Atentigo.

Ni petas niajn legantojn atenti la prospekton de la firma Ferd. Hirt & Sohn en Leipzig,

aldonite al la hodiaŭa numero, pri Nova Esp. Literatura. Precepte ni atentigas pri la nova prezista troviganta sur speciala folio en la prospekto.

Al ĉiulandaj kooperativaj organizaĵoj.

Antaŭ tri jaroj kelkaj regionaj kooperativaj organizaĵoj de Orienta Siberio akceptis Esperanton por sia kultur-kloriga agado, sed praktike ili ĝis nun ne ankoraŭ ĝin uzas.

Por montri al ili kaj aliaj samfakaj organizaĵoj la praktikan valoron de Esperanto por internaciaj rilatoj de diversnaciaj kooperativaj organizaĵoj, Centra Esperanto Komitato petas al ĉiulandaj kooperativaj organizaĵoj, kiuj jam per Esperanto interrilatas kun eksterlando, skribi oficialajn leterojn al kooperativaj organizaĵoj (tutrespublikaj kaj regionaj) de O. S. R. kaj sendi kopiojn de koncernaj poresperantaj rezolucioj.

Ĉion dume adresu al Centra Esperanto Komitato (u. Ĉita, poŝtkesto 36), kiu kontigos kooperativajn organizaĵojn pri enhavo de ricevotaj leteroj.

Gazetaro.

The Wireless Age, sept. La plej grava amerika revuo pri radiofono, kun artikolo de J. D. Sayers pri Esp. kiel radio-mondlingvo.

Medicamenta, Rio de Janeiro, jul. Kun recenzo de la spec. n-o de ET pri Brazilia Ekspozicio.

The Yorkshire Observer, Bradford, 15. 9. (Kun vasta rubriko en Esperanto.)

Sparks Fortnightly, Perth, Aŭstralio, 12. 8. (Anglalingva ĉefartikolo „La forto de Esperanto“ kaj alia artikolo en Esp. kaj angla lingvoj.)

Suomen Urheilulehti, Helsinki, n-o 33. Gnava flina sport-revuo, speciala n-o en Esperanto. Vidu sub „Recenzo“.

Neue Zürcher Zeitung, 14. 9. (Detala raportoj pri la kunidoj de la V-a Komisiono de L. d. N. pri Esp.)

Journal de Genève, 8. 9. (Art. de R. de Saussure: Lat. int. lingvo kaj la L. d. N.)

Le Droit du Peuple, Lausanne, 5., 13., 14., 15. 9. (Kongreso Helsinki, Esp. ĉe L. d. N., artikoloj de Edm Privat. SAT.)

Le Journal du Peuple, Paris, 11. kaj 14. 9. (Pri SAT, Publika letero de E. Lanty al Romain Rolland.)

Dos Naje Lebn, Białystok, 8. 9. kaj 6. 9. (Daŭrigo de raportoj de s-o Šapiro pri Danziga Antaŭkongreso.)

Reichenberger Zeitung, 8., 10., 12. kaj 14. 9. (Artikoloj pri Esperanto.)

Vorwärts, Reichenberg, 14. 9. (Art. kaj anonco pri Esp. kurso.)

Hotel- und Gastgewerbezeitung, Reichenberg, 14. 9. (Art. pri Esp. de F. Kaulfers.)

Biuletyn II. Targów Wschodnich, Lwów, Pol., 15. 9. (Art. en Esp.)

La Stampa, Torino, 14. 9. (Pri Esp. Kongreso en Trieste.)

La Fratrilie, kontraŭalkohola gazeto en Lyon, sept. (Respondo de art. de prof. Aulard el „Le Progrès Civique“.)

Kosmopolit, Dresden, sept. (Tre favora al Esperanto)

Wolne Slovo (Libera Vorto), nacie-radikala gazeto en Kraków, 28. 8. (Favora art. pri Danziga Antaŭkongreso.)

Polska Gazeta Lekarska, plej grava pola kuracista gazeto, n-o 56. (Favora art. de D-ro Blassberg el Kraków pri „Medicino kaj Esperanto“.)

Klas, ĉeĥa junulara gazeto, enkondukis daŭran Esp. rubrikon, redaktatan de I-ino Šupichová.

Arbeiter-Zeitung, 29. 8., kaj Die Rote Fahne, 30. 8., ambaŭ en Wien, kun recenzo pri aŭg.-sept. n-o de Sennacieca Revuo

Neues Wiener Journal, 2. 9. Kronen-Zeitung, 2. 9. kaj Morgenzeitung, 5. 9., en Wien. (Pri akcepto de Esp. ĉe British Labour Party kaj Daily Herald.)

Francaj gazetoj pri la XIV-a.

Krom la jam menciitaj raportoj pri la Kongreso de Helsinki ankoraŭ jenaj francaj gazetoj: La Presse Française en Strasbourg, L'Express de Millhouse, L'Alsace kaj La France de l'Est en Millhouse (Mülhausen). Le Revell Social en Annecy kaj Le Courrier de Ceret.

Alvoko.

Mi ricevis teruran, kortuŝantan poŝtkarton, kiu mi ne povas kaŝi de ĉiuj samideanoj. D-ro N. Foss, bestkuracisto, loĝanta en urbo Ufa (Rusujo), str. Puŝkinskaja 77, malnova delegito de UEA, reprezentanto de TEKA kaj fervora Esperantisto, skribas: „Bone memorante, ĉiam kun danko, vian netakseblan komplezon, kiun vi faris al mi dum mia tifo en Varsovio, nun mi decidis, malgraŭ la konfuzo denove maltrankviligi vin per la jena peto: **Morto por malsato minacas al mi kun la familio; certe vi scias pri la granda malfeliĉega kaptinta nian regionon; estas nekalkuleblaj viktimoj de l' malsato, multaj manĝas arbĉelon, argilon, sterkon, ratojn kaj eĉ homkadavrojn... Bonvolu savi nin per sendo de manĝaĵoj, ekspedebla per American Relief Administration.**“

Mi nenion aldonas al la supraj vortoj kaj esperas, ke dank' al la tuj subteno de samideanoj la familio Foss restos viva. La Varsovia Esp. Rondo „Konkordo“ sendas la unuan manĝopakaĵon por 10 dolaroj. Sekvu la plua!

D-ro W. Róbin.

Parolejo.

124. Respondo al 122.

Mi tute aprobas la vortojn de via leganto C. el Port Said: „Ni estu precizaj!“ Sed tio ne signifas, laŭ mia opinio, ke estas necese ĉiam aldoni ĉiujn detalojn. Tiam ET certe devus esti 8-paĝa. La tute ne mirigan aserton oni povas trovi en la Raporto de la 4-a Komisiono de la Ligo de Nacioj de 1. oktobro 1921. Mi enfermas duoblan ekstrakton de la flurilata stenografita raportoj de la parolado de s-o Noblemaire; unu por la redaktoro de ET kaj alian por nia samideano en Port Said. Ni havu konfidon al la seriozeco kaj ĝusteco de la raportoj de la ET-kunlaborantoj. (R. el Hago.)

125. Zamenhofa Monumento.

En ET n-o 99 mi kun miro legis en la raportoj pri la III-a Labora Kunsido en Helsinki jenajn vortojn: „S-o Stan. Essigman (Warszawa) nome de la Loka Komitato por la Starigo de l' Monumento informas, ke ĝi estos preta post du jaroj“ ktp.

Mi estas devigata informi samideanojn, ke s-o E. ne estis rajtigita paroli en la nomo de la Loka Monumenta Komitato, tiom pli, ke li ne estas membro de la nomita Komitato kaj eĉ unu fojon ne partoprenis en ĝiaj kunsidoj. Tial la „informoj“ de s-o E. al la Kongreso ne povis esti precizaj kaj nur erarigis la Kongresanojn. Ekz. la informo, ke la monumento estos preta nur post du jaroj, povas esti nur propra opinio de s-o E., ĉar la skulptistoj asertas, ke ili povus finkonstrui la monumenton ĝis la aŭgusto de la sekvonta jaro.

D-ro W. Róbin,

Prezidanto de la Loka Komitato por Starigo de l' Monumento.

Redakcia Leterkesto.

S-o B. en Haag. — Vi skribas: Nürnberg. Certe por ni Okcident-Eŭropanoj bonvalutaj estas granda allogo tiu urbo. Sed mi timas, ke tiu urbo ne povos enhavi kelk-milojn da kongresanoj. Forprenu rapide tiun antaŭtimon! — Ni ĝojas, ke pri tio ni povas respondi al vi, ke Nürnberg estas grandurbo de 3—400 000 loĝantoj (kun „fraturo“ Fürth ĉ. 500 000), ke ĝi estas multe vizitata de fremduloj, kaj ke jam multaj kongresoj okazis en tiu urbo. Do ni ne timas, ke 3—5000 aŭ eĉ pli da Esperantistoj trovos azilon en la kongresurbo dum 1—2 semajnoj; kiamaniere, tion ni plenkonfide lasu al la loĝiga Komitato.

S-o Y. O. en Finnlando. — Ni petas pardonon, ke ni malgraŭ nia promeso ne povis publikigi vian prisportan raporton, ĉar nia manuskripto estas tro ampleksa. Esperable ni akirus baldaŭ sufiĉe da abonantoj por povi ĉi-doni ET sespaĝa; tiam ni povos aperigi pli multajn artikolojn pri tutmondaj aferoj necesperantistaj.

S-o N. G. N. en G. — La ilustrita artikolo pri la Ekspozicio de Göteborg aperos certe en n-o 104.

Al diversaj. — Nepre necble estas al ni tuj publikigi ĉiujn artikolojn kaj raportojn ricevintajn en la lastaj semajnoj. En antaŭaj numeroj la raportoj pri la XIV-a okupis la ĉeflokon, dum en la hodiaŭa numero la gravaj protokoloj pri Esperanto ĉe Ligo de Nacioj bezonas multe da loko. Se do iu alia artikolo devas esti prokrastata al iu sekvonta numero aŭ tute ne povas aperi, la verkintoj bonvolu ne koleri al ni. Se ĉiu el niaj abonantoj varbus nur unu plian abonanton kaj kolektos ĉiujare nur unu anoncon po 3—4 svisaj frankoj, ET povos esti regule 8-paĝa kaj havos lokon por ĉiuj iom gravaj artikoloj.

Recenzejo.

LIBROJ.

ESPERANTO W DZIESIECIU LEKCJACH. (Esp. en dek lecionoj) lernolibro por poloj kun „Klucz“ (ŝlosilo, enhavanta tradukon de l' Esp. kaj pola ekzerco de la lernolibro). Eldonita en „Biblioteka Powszechna“ (Biblioteko Universala) de Wilhelm Zukerkandel en Złoczów, Pol. Prezo 210 pmk., por la ŝlosilo 70 pmk. — Laŭ la konataj lernolibroj de Prof. Cart (franca) kaj J. Borel (germana) prilaboris Dr. Emil Pfeffer.

En Polujo oni forte sentas la mankon de pli granda elekto en diversaj lernolibroj Esperantaj. Ne ĉiu kursgvidanto ŝatas la metodon de instruado, aplikatan jen de ĉi tiu, jen de tiu nun havebla lernolibro. Des pli ni devas ĝoii pri ĉiu nove aperinta lernolibro pollingva. La nomitaj lernolibroj kaj ŝlosilo aperis jam antaŭ la milito, sed mi supozas, ke ankoraŭ nun estas haveblaj pli grandaj kvantoj de la eldonejo. — Cetere la recenzo estas necese. La verketoj estas lerte prilaboritaj laŭ la ĉie kiel bonaj instruiloj konataj lernolibroj de Prof. Cart kaj J. Borel. Unuvorte: Nepe rekomendinda al ĉiu kursestro, kiu ŝatas ne tro rapidan, sed des pli profundan instruadon.

GAZETOJ.

SUOMEN URHEILULEHTI, Helsinki, n-o 33. Grava flina sport-revuo. Speciala numero en Esperanto, eldonita okaze de la XIV-a. Kun multaj tre interesaj kaj riĉe ilustritaj artikoloj pri diversaj sportoj en Finnlando. Adreso: Erottaja 4, Helsinki. Prezo 2 valdaj Resp.-kup. aŭ monbiletoj laŭ valoro de unu franko.

Svenska Arbetar-Esperantisten. Sept. Organo de Svenska Arbetar-Esperanto-Förbundet. Sciigas, ke la Asocio ne estas speciale komunistaj, sed ke ĝi havas soc. dem. dem. socialistajn, komunistajn, anarkistajn kaj sindikalistajn anojn.

Litova Stelo. Aŭgusto.
Esperanta Ligilo. Sept.
Le Monde Espérantiste, jul.-aŭg.
Informa Bulteno, n-o 5.
Sudalava Poŝto, sept.
Corriere Balcanico-Esperantista. 30. 8.
Marto, sept.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstrio: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien III, Postkaŭ 34.
Belgio: Frans Schoofs, 45, Kl. Beernaert, Antwerpen. Poŝtkase n-o 29430.
Brazilo: Brevia Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgario: Georgi Ar. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovakio: Otto Sklenka, Hradec Králové. Otio Lumpe, Trautenau.
Estonio: Est. Esp. Unuigo, poŝtkas. 6, Tallinn.
Finno: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franco: Esp. Centra Librojo, 81 rue de Cligny, Paris 9.
Hispano: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalun.
Hungaro: Paŭlo Balkányi, Helos-utca 15-11-2, Budapest VI.
Japano: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Jugoslavio: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, jezuitska ul., br. 1.
Latvio: Talivaldo Indra, Riga, Pasa kaste 47b.
Litovo: Paŭlo Medem, Smilū g-vė 12, Kaŭnas (Kovno).
Nederlandoj: J. Ravenstein jr., v. Aerssenstraat 300, 's-Gravenhage. (Post-ĉeka konto Haag n-o 2878.)
Polo: Adolfo Oberholman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. n-o 3126). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumano: Esperanto-Oficejo, Cluj.
Ruso: Mikaelo Valentinov, Cudovoj per. 6, Komitato de Esperantistoj SVJAZL.
Svedo: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Nürnberg.

ET intencas eldoni en oktobro aŭ novembro 8-paĝan ilustritan numeron pri la urbo de la XV-a Universala Kongreso, en eldonkvanto de ĉ. 12 000 ekzempleroj, por vekti en plej vastaj rondoj la intereson por la venontjara kongresurbo.

Jam nun ni atentigas la tutmondan komercistaron kaj industristaron je tiu favora okazo por reklami pri siaj entreprenoj en ĉiuj sferoj de la Esperantistaro.

Ni intencas dividi la anoncan paĝon de tiu ĉi numero en ĉ. 64 anoncaj kadroj, el kiuj ĉiu havos ĉ. 20 centimetro-kvadratojn. La prezo de unu kadro estos 3 svis. fk. aŭ egalvaloro (antaŭpagota); por malbonvalutaj landoj 2 fk. (Germanlando, Aŭstrio, Hungarujo, Ruslando, Balkano, Baliko). Ĉe mendo de 4 kadroj ni konsentos rabaton de 10%, de 8 kadroj (okona paĝo) 20%, de 16 kadroj (kvarona paĝo) 25%.

Al kolektantoj de anoncoj ni konsentos rekompencon de 33 1/3%, t. e. unu triono de la pagota sumo; ĉe kolektado de minimume 4 kadroj 40%.

Ni petas komenci jam baldaŭ la kolektadon, por ke la anoncoj alvenu ĝustatempe, kaj por ke ne okazu, kiel eĉ nia 100-a numero, ke pli ol tuta paĝo da anoncoj alvenis tro malfrue, tiel ke ili ne plu povis aperi en la 100-a numero.

Ni atentigas speciale, ke ni akceptos 2—4 anoncojn presotajn en blua koloro. Ili kostos 50% pli ol la nigre presotaj.

Eventuale dezirata anonco en la dekstra titol-angulo kostos 9 svis. fk., por malbonvalutuloj 6 fk.

Dekoradu vian hejmon!

**Simplaj
mebloj luksaj,
kontor-aranĝoj**

liverataj per meblo-
fabriko de

Josef Hlavaty, Ĉeĥosl., Hradec Králové II.
proksime de la Teerag.

Gejunularo!

Antaŭ mallonga tempo la „Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj“ sendis al multaj gejunuloj aliĝilojn por disdoni. Sed nur malmultaj aliĝis. Pro tio ni vokas la gejunularon per gazeto: „Venu ĉiuj!“ La ĉeflaboro jam estas farita, sed nun ni esperas, ke la junuloj kaj knabinoj aliĝos multnombro. Ni volas labori; ni volas montri, ke la junularo ne dormas. Kiu ĝis nun ne ricevis aliĝilon, mendumu ĝin al la sekretario. La kotizo estas por la jaro 15 mk. (por 1922 pagu 7,50 mk.). Ĉiu junulo aŭ -ino ne pli aĝa ol 24 jarojn povas aliĝi. Mondaĵojn sendu al poŝtĉeka konto 62963, Breslau, Gerhard Habelok.

Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj
Sekretario: Breslau, Schleiermacherstr. 19.

J. Katschner a syn

Hradec Králové, Ĉeĥoslava Respubliko.
Telefona numero: 60.

Marcipano — Mielbakaĵo — Vermiceloj

Ni akceptas ĉiulandajn reprezentantojn.

Jus aperis

eldonita de Księgarnia Robotnicza
(Laborista Librejo), Warszawa, ul.
Wspólna 17, Polio:

Ekzilo

Rememoroj de Aleksy Rzewski.
Esperantigis kun permeso de la aŭtoro
K. Domostawski.

La aŭtoro, esinta Lodza laboristo, estis kiel fervora ano de socialista partio dum la revolucio de 1905 l. arestita de la rusa registaro kaj ekzilita Siberion. Forkurinte de tie en 1907 l., li laboradis ĝis 1912 j. en diversaj urboj de Francio kaj Germanio. El tiuj tempoj devenas liaj tre interesaj rememoroj.

En nova liberiginta Polio R. estas unu el la plej amataj ĉefoj de pola laboristaro. En sia hejmurbo Łódź li estas elektita je urbestro. Estante mem Esperantisto, li varme subtenas nian movadon kaj estas elektita kiel honora komitatano de la I-a Tulpola Esp. Kongreso.

Prezo de la 58-paĝa libreto afranke 0.50
svis. fk. aŭ egalvaloro. Por malbonvalutaj
landoj 25% rabato.

Esperanto Service Corporation

„Esko“

500 Fifth Avenue New York City
Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Ĉeto, eksporto, importo kaj maklerado
de ĉiuj speciaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke
ricevataj.

D-ro Richard Aninger

Kotonsplinoj kaj -teksejo, blankigejo.

Kolorigado — Pretigado

Ameriko 10/40 — Okcidentind. 3/10

Zefiroj, flaneloj ktp.

Hradec Králové Wien
Ĉeĥosl. Respubliko Aŭstruja Respubliko
Telefona numero: 91 Telefona numero: 22849

Malmultekostaj donacoj delikataj!

La hungaraj artaj manbrodaĵoj,

puntaĵoj, broditaj koloraj tukoj, kusentukoj, virinaj mensaketoj, ledaj mansaketoj kaj viraj monujoj kun batik-koloro, pupoj nacivesitaj manfaritaj, kaj koloraj skatoletoj tre plaĉis dum la kongreso en Helsinko!

Por bonvalutaj landoj malmultekostaj kaj belaj donacobjektaj! Specimenkolekto por 20 sv. fk. aŭ egalvaloro. Ekzempleroj haveblaj de 3 sv. fk. Taŭgaj por revendo. — Mono sendota antaŭe! — (Per tiu manlaboro subtenas sian vivon nun multaj hungaraj sinjorinoj kaj fraŭlinoj! Per mendo VI do helpas ankaŭ ilin). Mendojn adresu al la delegito de Budapeŝt, Paŭlo Balkányi, VI, Hajos u. 15., Hungarlando. La fremduloj vizitante Hungarlandon ĉiam aĉetas multajn tiuspecajn objektojn!

Avizo.

Pro vojaĝo de l' gvidanto de nia firma, kiu daŭros supezeble ĝis 5. oktobro, ni devos prokrasti mendojn kaj respondojn ĝis lia reveno. Ni petas nian ŝatatan klientaron priatenti tion.

Butin & Jung, Godesberg.

Postmarkoj.

Mi vendas diversajn bonegajn bulgariajn postmarkojn je favoraj prezoj. Numerojn laŭ Yvert-Tellier kaj Michel.

Ankaŭ paketoj:

1 pak. kun 80 div. pmk. 70 levoj, 10 pak. 500 lev.

1 pak. kun 100 div. pmk. 80 levoj, 10 pak. 700 lev.

Antaŭpago per bankbiletoj aŭ ĉeko.

Mi kalkulas 100 bulg. levoj = 0.80 dolaro, 10 francaj aŭ belgaj frankoj, 15 liroj, 20 ĉ. kronoj, 2 guldenoj, 3 ŝilingoj,

4 avisaĵoj frankoj.

Vasil Iliev, Varna, Bulgario, Ulica „S. Metod“ n-o 17.

Nederlanda Anonima Societo

Luksa-pano Fabrikoj

antaŭe Henri J. Carels.

50 Butikoj:

Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels

(ĉefo: H.A. Scharwächter)

65 Welmarstraat, Den Haag.

Oni parolas Esperanton.

Vestu vin

bone kaj malmultekoste!

Ni liveras bonstojajn pantolonajn ĉiuj speciajn (konfektionajn kaj laŭ mezuro). Liveranto al multaj Esperantistoj. Postulu prezilon kaj specimenojn per la oficejo de la Komercista Esp. Grupo Zittau.

Joh. P. Schmidt, Zittau i. Sa. 85 (Germ.).

Pomojn, Pirojn

kaj aliajn fruktojn de norditala provinco Trentino
eksportas pogrande

Basilio Travaglia, Trento, Italio.



375 paĝojn

de praktika Esperanto vi
trovas en la ĝenanuna kolekto de

Internacia Komerca Revuo

Tiu revuo estas plej grava,
ĉar ĝi praktike utiligas la lingvon!

Vi devas absolute subteni ĝin!

Specimenon petu de la eldonejo en ZÜRICH (Svial.),
Stampfenbachstr. 69.

Jus aperis!

„La Nova Epoko“

kajero dua,
20-paĝa, ilustrita, kun interesa literaturo, populara kaj Esperantimovada materialo. Postulu ĉe la samnoma eldonejo (1-a Tverskaja-Jamskaja, 38, kv. 5 Moskvo, Rusio), sendante per monbiletoj sumon egalvaloran al aŭtranko de registrita eksterlanda letero. Abonobla ankaŭ ĉe „Sennacieca Revuo“ (177, Rue de Bagnolet, Paris XX (Francio). Jara abonprezo fr. 12, g. mk. 150, ŝil. 6, dol. 1.50, por membroj de SAT, de l' jara abonprezo por

„Sennacieca Revuo“

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj (krom unu adreso) 0.20 dol., 0.50 fl., 1 nerd. kr., 1 ŝil., 1 svis. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 3 lit., 7 fmk., 8 kc., 120 gmk., 120 hung. kr., 600 pmk., 5000 atst. kr. Ĉiu povas pagi per la aŭtoro la nomitaĵojn, sed laŭ la aktuala kurso de sia propra valuto, aŭ 8 stamp. resp. -kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 3 franc. fk. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkanto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas elveni 10 tagojn antaŭ publikigo. — Aŭstrajn monbiletojn ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli, polajn de 100 mk. aŭ pli.

FIANĈIGO. Niaj gesamideanoj f-inŝ Tilla Hetzeneker el München kaj s-o Max Edelmann, prezidanto de la Esp. Grupo Bad Reichenhall, gefianĉigis la 7. sept.

EDZIĜO. S-ano Josef Paša, minoficisto, del. de UEA, edziĝis kun f-inŝ Alojzka Mičková, instruistino, kaj translokiĝis el Muglinov al Malé Kunčice n/Ostravici.

MORTO. S-o Sembal, socialista deputito, franca ekaministro, mortis. Li tre favoris Esperanton kaj skribis gratulan leteron al s-o Archdeacon pro lia libro „Kial mi fariĝis Esperantisto“.

POR TRI FRANKOJ (malbonvalutuloj du frankoj) vi havos elkan anoncon en la speciala numero de ET pri la venonta kongresurbo Nürnberg. Legu la tre favorajn kondiĉojn en nia hodiaŭa numero!

KIO DORMETAS EN VI? — Sendu al mi vian naskiĝdaton, profesion, iom da skribaĵo de vi kaj unu svisan frankon aŭ egalvaloron, kaj mi diros al vi, kion vi povos atingi en via vivo. — Grafologo H. Klubna, Wien V., Storkgasse 12.

BONVOLI sendi al mi tiajn numerojn de nacia Esperantogazetoj, kiuj enhavas raportojn pri la XIV-a. Mi rekomencos laŭ via deziro. — T. A. Lindberg, Parola, Finnlando.

VARBU anoncojn por la speciala numero de ET pri la venonta kongresurbo Nürnberg. Granda rekomenco por anonekstantoj. Legu la kondiĉojn en la hodiaŭa numero!

ĈEĤOSLOVAKIO. — 21-jara komizo, parolanta boheme, germane kaj Esperante, bona kalkulisto, serĉas OKUPON kiel vendisto en komerco de miksitaj komercaĵoj. — Gustav Vrba, Vitkovice, Zengrova 42, Ĉeĥoslovakio.

AL MIAJ AMIKOJ! — Mi translokiĝis, kaj mia nova adreso estas: Anni Nora Pickert, Hoheneibe, Neustadt 333, Bohem.

„DANA ADRESEJO“ por komerco, industrio, reklamo ktp. informas pri ĉiu afero, kontraŭ respond-kupono. — Lendroff Dybbølsge 88, Kopenhago B.

ELDONEJO „ESPERANTISTA VOĈO“ (posedanto: Salo Grenkamp-Kornfeld), Jaslo, Pollando, liveras ĉiujn Esperantajn librojn. Petu prezaron! Liveras ankaŭ ĉiujn postmarkojn plej malĉare. Kontraŭ referencoj aŭ deponita mono forsendas postmark-elektojn.

FOTOGRAFINTOJ EN HELSINKI! — Promesintoj (kaj nepromesintoj) bildojn por lumbildaparolado, bonvolu sendi kopiojn resendotajn. Nur post elekto kaj sciigo ili sendu la originalajn platojn, filmojn necesajn por diapozitivoj. — Dr. Döhler, Riesa (Elbe), Germani.

RUSAJ SAMIDEANOJ! — Kiu scias ion pri la nuna sorto de Johan Ocsófsky, hungara militkaptito, kiu laboris ĉe Jakob Vasil Voronkin en Starapolska Huberni, Nikolskiodorf (Kaŭkazo)? De 1917 nenion aŭdis pri li liaj gepatroj. — Bonvolu skribi al Francisko Lerch, str. N Jorga n-o 8, Rumanio, urbo Petroŝeni.

JUNA BANKOFICISTO ne maldungita, fraŭla, serĉas pozicion por tuj aŭ pli poste. Scipovas germanan, anglan, francan, Esperantan lingvojn. Bonvolu adresi: s-o L. Funken, Florinmarkt 7 a. l., Koblenz, Germanlando.

SUDITALIO. — Ĉiulandaj samideanoj, kiuj trovas aŭ konas publikadojn lamiarajn rilatajn al Suda Italio (precipe regionoj de Napoli, Basilicata, Kalabrio), bonvolu havigi al mi detalajn informojn kaj resumojn Esperantlingve. Tiun el samideanojn, kiu ekkas propagandon de nia kara lingvo, mi pagos aŭ rekomencos laŭdezire. — Fidia Cesarini, del. UEA, Potenza (Italio).

GRAVA INFORMILO por ĉiu korespondanto kaj kolektanto BES-A ADRESARO. Nova, kvara eldono. Prezo: 1.50 svis. fk. Por germanoj kaj malbonvalutuloj 80mk. frankite. — Tuja sendado post pago. Havebla ĉe Esperanto-Eldonejo Butin & Jung, Godesberg (Germ.).

GELABORISTOJ! — GEIDEALISTOJ! — Ĉiuj, kiuj volas lerni pri loko en Usono, kie sinjor(ino) kun familio povas vivi tiel malkoste kiel fraŭl(in)o sen dependantoj; kie ne estas bezono de asekuro; kie infanoj instruiĝas sian devon al la prahomaro laborinta; kie manko de zorgo pri vivrimedoj ebligas grandan kreskon mensan, moran kaj korpan; kaj kie estas nek riceco nek malriĉeco; kie la ora regulo estas la sola leĝo — ĉiuj, kiuj akceptas „Homidaro“ kiel dio inda de ilia laborservo, devas skribi sian adreson legeble sur postkarto kaj adresu al E. A. Young, Balboa Heights, Kanala Zono, Istmo de Panamo, Ameriko.

HIGIENAJN KAJ HIRURGIJN KOMERCAJOJN el mola kaj malmola kaŭĉuko oni aĉetas ĉe Alfred Feller, Wien I, Sonnenfelsgasse 11, Aŭstrujo. Korespondas angle, france, germane, itale kaj Esperante.

Paperhelpmono. — Mi vendas paperhelpmonon de Germanlando kaj Aŭstrujo. Sendu al mi respond-kuponon kaj mi sendos seriojn da helpmono. — H. Frye, Bremen, Germ., Oldenburgerstr. 4.

S-o Laurent Bruhy, rue Biolly n-o 1, Verviers, Belgio, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. postkarto (bfl.) kun ĉiulandanoj.

S-o Lidard, Glenecroft, Grenfell Road, Maidenhead, Angluto, deziras gekorespondantojn ĉiujn per siaj kursanoj (plenajuloj, komencantoj), komence postkarte.

S-o Karel Van Berendonck, Kattenberg 10, Borgerhout-Antwerpen, Belgio, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj per leteroj kaj ilustr. postkarto (bfl.).

Serioza interŝanĝado kaj vendado de postmarkoj laŭ katalogo Michel, Senf. — Lichtmann Nandor, Miskolcz, Hungarujo, Szemere utca 27.

Karlo Kočí, studento, Velky Osek u Kolina n/L., Bohemujo, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per leteroj kaj postkarto kun samideanoj el la tuta mondo.

S-ino Kaisa Lingman, Pori, Järnefeltink. 25, Finnlando, deziras korespondi per ilustr. postkarto aŭ leteroj kun ĉiulandanoj (fremdlandanoj) Esperantlingve.

Filatelistoj! — Soleri Luigi, V. Amandoria 5-9, Genova, Italio, deziras interŝanĝi postmarkojn kun seriozaj filatelistoj.

Kiu sendas 50—100 postmarkojn de aĵa lando, ricevos la saman kvanton belgajn de s-o R. Van Rompaey, Berthoutstraat 27, Berchem-Antwerpen, Belgio.

Otto Nitsche, Berlin, Petersburger Str. 46, sendas tuj 100 germanajn postmarkojn por la sama kvanto de aĵa lando.

S-oj Lucien Etienne, 26 rue Fazillau, Paul Corbaon, 44 rue Fazillau, kaj Lucien Talenton, 60 rue Fazillau, ĉiuj en urbo Levallois-Perret (Seine), Francujo, deziras korespondi kun la tutmondo per postkarto ilustr. (bfl.).

Antonio Costa, Rua do Carrião 22, Lisboa, Portugalujo, deziras korespondi postkarte aŭ letere kun ĉiulandaj samideanoj.

Fraŭlo Väinö Häkkinen, Viipuri, Saimaan Piirikonttori, Finnlando, deziras korespondi per leteroj kaj postkarto ilustr. kun ĉiulandanoj.

40—50 diversajn mialandajn postmarkojn mi sendas por la sama kvanto vialandaj: Zuber, Trautenau, Elektrastrasse 7, Ĉeĥoslovakio.

S-ano Felikso Jaŭsoro, Irata-Barri, Villa Fica, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi ilustr. postkartojn kun samideanoj de ĉiuj landoj.